**[uea-membroj] EKO 2036-1 Kongresoj**

**Stefan MacGill via groups.io** <stefan.macgill=gmail.com@groups.io>
Responder a: uea-membroj@groups.io
Para: listo 'nova uea-membroj' <uea-membroj@groups.io>

12 de janeiro de 2026 às 03:09

# Niaj kongresoj

La Universala Kongreso okazos en Graz, Aŭstrio, la kongreso de TEJO en Katalunio kaj la kongreso de ILEI en Zhaoziang, Ĉinio. La fervojistoj kongresos en Beograd, Serbio.

La tria aliĝperiodo por UK finiĝos la 30-an de junio. Plenan informon trovu ĉe uk.esperanto.net/kotiztabelo.

La kongresa temo de la 111-a UK estas **"Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo"**. Ĝi ligiĝas al la Internacia Jaro de Volontuloj por Daŭripova Evoluigo, kiel deklaris UN pri 2026. Aliĝu al la dissendolisto groups.io/g/KongresaTemo por kontribui al la kongrestema programo de la UK. Proponi programerojn al la UK jam eblas per mallonge.net/UK26proponuprogrameron.

# Studoj kaj ferioj meze de Francio

La studperiodo **Printempas** okazos **de la 17-a ĝis la 26-a de aprilo 2026**, ĝi inkluzivos **Esperanto-kursojn** en ;a kvar niveloj, ekzamenojn, distran-edukan programon kaj ekskursetojn. La kursojn gvidos niaj spertaj instruistoj: Marion Quenut el Tuluzo, KÓRÓDY Zsófia kaj Birke Dockhorn el Germanio, Paweł Fischer-Kotowski el Nederlando. Detalojn legu en gresillon.org/p aŭ skribu al ni retmesaĝon.

La **Multaktivec-tagoj** okazos **de la 26-a de aprilo ĝis la 2-a de majo 2026**, ili inkluzivos **biciklajn** promenojn kun BEMI (Eddy van den Bosch), ĥoran (korusan) **kantadon** kun *Interkant* (Bernard Bigonnet), pratikadon de Esperanto kaj **Biblio** kun Benoît Ente kaj pliajn programerojn. Detalojn legu en gresillon.org/k aŭ skribu al ni retmesaĝon.

Vi povas aliĝi diversmaniere: Aliĝi per reta formularo -- Printi kaj sendi paperan aliĝilon -- Sendi retmesaĝon -- Telefoni al +33-6.51.24.24.23

# La suno brilas en Ĉinio

Laste oni ofertas al mi projekton de Sunenergia elektrigo. Praktike ĉinaj kompanioj investas en sun-elektriga projekto por entreprenaj uzantoj aŭ lokaj aĉetantoj, kaj poste, elektruzantoj redonos investon kaj profiton per elektrokotizo, aŭ kunlaboranto vendos elektrojn al lokanoj... Ŝajne tia investo donos al ni praktikan ŝancon ĉu ne? Se vi jam havas konkretan projekton por tia kunlaboro, skribu al mi, kaj mi informos ĉinajn kompaniojn

IKEF Ĉinio.

## Kongreso en Israelo

La 26-a kongreso okazos inter la 9-a kaj 12-a de aprilo 2026 en la dezerta urbeto Micpe Ramon. Konforme al la ĉeftemo “Tero kaj Kosmo” okazos duontagaj ekskursoj al la apudaj kratero Ramon kaj stelobservejo. Estas planata karavano de Tel-Avivo kaj reen.

Postkongresa Ekskurso: estas en tri variantoj:

2-taga (aprilo 12-14) Eilat kaj la ruĝa Maro (taŭga ankaŭ por israelanoj)

5-taga (aprilo 12-16.) ankaŭ Jordanio: Petra kaj la Morta Maro,

10-taga (12-21.) ankaŭ Tiberiado, Nazareto, Haifa, Akko, Jerusalemo kaj Tel-Avivo-Jafo.

Pliaj informoj, prezoj kaj reta aliĝilo: https://esperanto.org.il/ik26.html

Amri Wandel

## Belga bunto

Internacia Esperanto-Arkivo (IEspA) realigas sian projekton "transformado de magazeno al arkivejo". La *Koning Boudewijn* fondaĵo kunlaboras en la projekto. La privataj donacoj ekde po 40 € jare al la Fondaĵo rajtigas je impostsubtraho de la reale donacita sumo (art. 145/33 WIB).

Ĉiuj 50 eŭroj donacitaj al IEspA tial kostas al vi nur 35 eŭrojn!
Juraj detaloj (nl fr de): https://fin.belgium.be/nl/particulieren/belastingvoordelen/giften

Ĝiru vian donacon por nia projekto, administrata ĉe la Koning Boudewijnfondaĵo, rete tra la paĝo
https://donate.kbs-frb.be/actions/PRA-DiestInternaciaEsperantoArkivoVzw
(elektu lingvon nl fr de en)

## Festado en Nepalo

Okazis la 166-a Zamenhofa Tago en Katmanduo kun la partopreno de 37 membroj. Dum la programo parolis gesinjoroj Philip Pierce, Indu Devi Thapaliya, Shrijana Joshi, Nabin Lal Shrestha, L. P. Agnihotri kaj Sabita Dahal pri Esperanto kaj la vivo de D-ro L. L. Zamenhof. Unuminuta silentado estis observata omaĝe al la Esperantistoj forpasintaj dum la pasinta jaro. Krome, ĉi-jare forpasis tre aktivaj kaj gravaj Esperantistoj — Renato, Roman kaj Rob kies foriroj estas granda perdo por la evoluo de la lingvo Esperanto. La programon inaŭguris la prezidanto de NEspA, kiu poste prezentis prelegon en Esperanto kaj en la nepala lingvo . La aranĝo finiĝis per bongusta manĝaĵo preparita de Harka, Sushila, Shanta kaj Parsuram. La tutan programon lerte kondukis la kasisto de NEspA, Dipak Shrestha.

## Rilate UN-agadon, ni troviĝas en interesa situacio

- Teamo sub gvido de François Lo Jacomo faris konsiderindan progreson pri rekono de Esperanto, en la kadro de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Samarkando antaŭ kelkaj semajnoj;

- TEJO elektiĝis al la estraro de la Konferenco de NROj en Konsulta Rilato kun UN;
- nova teamo iom post iom formiĝas en Ĝenevo dank' al iniciatoj de Mireille Grosjean;
- intensiĝas la agado lige kun interreta informado pri Esperanto, unuavice per nia retejo esperantoporun.org gvidata de Rafael Lima,
- kaj ankaŭ en Fejsbuko dank'al Jon Liechty,
- kaj per la nova kunlaboro de Quintyn Bobb kaj la multjara fidela kunhelpo de Sofija Soskina,
- kaj UEA aktive rolas en la Komitato de NROj pri Lingvoj, kies prezidanto estas UN-reprezentanto de UEA Francis M. Hult.

Alessandra Madella

## Akademie

Je la Zamenhof-festo, la 15-an de decembro 2025 okazis en la reto la 5a Konferenco de la Akademio de Esperanto, dum kiu prelegis kvin akademianoj: Amri Wandel, Bertilo Wennergren, François Lo Jacomo, Jesper Jacobsen, Edmund Grimley Evans; en la konferenco estis anoncita la laŭreato de la Laŭro de la Akademio: poemaro "Ek sor!" de Evgenij Georgiev.

Legu en "La Ondo de Esperanto" ĉe https://sezonoj.ru/2025/12/akademio-35/

## Plezuro por interlingvistoj

Nun haveblas la numero 134 de Informilo por Interlingvistoj (IpI):

IpI - kaj ĝia anglalingva versio, IfI - estas eldonitaj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Niaj novaĵleteroj disponigas informojn pri interlingvistiko kaj lingvoplanado, kun detaloj pri eventoj kaj novaj publikaĵoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj,

## Januaraj festoj

En januaro ni festas la 135-ajn naskiĝdatrevenojn de du grandaj Esperantaj poetoj Gyula "Julio" Baghy kaj Nikolaj Ivanoviĉ Ĥoĥlov. Legu la liston de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por januaro 2026, kompilitan de Aleksander Korĵenkov, en la vintra eldono de ***La Ondo de Esperanto*** kaj en la samtitola novaĵretejo ĉe https://sezonoj.ru/2026/01/januaro-10/

## La lego-lukto

La 97-a Sumoo komenciĝos la 11-an de januaro dum du semajnoj. Mi atendas vian aliĝon.  Ni ĝuu legadon kun esperantistoj en la mondo. Vizitu nian retejon: http://www.esperanto-sumoo.pl/

Afrika Komisiono en kunlaboro kun la Estraro de UEA havas la plezuron anonci oficiale, ke Togolando estas selektita por gastigi la 9-an Afrikan Kongreson de Esperanto (AKE). Ĉi tiu tutkontinenta evento okazos en Kpalime, la kvara plej granda urbo en Togolando kaj la ĉefa turisma centro de la montara regiono, de la 26-a ĝis la 31-a de decembro 2026.

Bonvolu legi pli ĉe https://www.esperanto-afriko.org/2026/01/10/afrika-esperantujo-rendevuas-al-togolando-por-la-9-a-afrika-kongreso-de-esperanto-jarsange-2026/

Adjévi Adjé

## Lud-reguloj por EKO-komunikoj

Skribu ĉiam per minimume 12-puktajn literojn. Mi ignoras ĉion, kion mi ne kapablas legi.

Pretigu bonan tekston kun 300-500 vortoj.

Ĉiam pensu pri la legantaro. Ĉ. 2800 aktivuloj de ILEI kaj landaj kaj fakaj asocioj kaj partoprenintoj en AMO-seminarioj.

Ĉiam uzu Unkodon. Ĝi ekzistas jam 70 jarojn kaj ebligas la korekta, aspekton de la Eo-karaktroj.

Stefan MacGill

Respondecoj en UEA: , EKO, Canuto.
Respondecoj en ILEI:  Juna amiko.

_._,_._,_

---

Groups.io Links:

You receive all messages sent to this group.

View/Reply Online (#6821) | Reply to Group | Reply to Sender | Mute This Topic | New Topic

---

La konversacioj en ĉi tiu listo estas privataj por la komunumo. Bonvolu ne afiŝi retpoŝtojn en vian blogon aŭ plusendi ilin, krom se vi certas, ke ĝi estas en ordo ĉe la verkisto.

: uea-membroj+unsubscribe@groups.io

---

Your Subscription | Contact Group Owner | Unsubscribe [paulo.pires@flugfolio.xyz]

_._,_._,_